# Historio de Goo en Japanio

Tradukaĵo el retpaĝo;

https://ja.wikipedia.org/wiki/囲碁の歴史

- Alveno al Japanio
- Disvastiĝo de Amantoj
- Ora Epoko de EDO


Naskiĝo de NIHON-KI-IN


(日本棋院: Japana GO-Instituto)

# - Alveno al Japanio

En “la TAIHOU-leĝaro(大宝律令: p.K. 702, la unua proklamita kolekto de leĝoj en Japanio)”
ekzistas artikolo rilata al go. En la *Suiŝu* (隋書: ortodoksa hitorio de 隋-dinastio), en la parto ″Raporto pri *Wa* (倭)-lando″, troviĝas la frazo: ″Ŝatas ludojn de GOo, *Woshuo* (握槊: triktrako), kaj *Chupu* (樗蒲: ŝancoludo kun ĵetplatoj)″, indikante ke tiuj ludoj estis popularaj.

Dum la HEIAN(平安)-epoko(p.K. 794-1185), GOo estis ŝatata kiel nobela amuziĝo kaj ofte aperas en reprezentaj literaturaj verkoj de tiu epoko, kiel “MAKURA-NO-SOUSI(枕草子)” kaj “La Rakonto de GENZI(源氏物語)”.






El “Bildorulaĵo de La Rakonto de GENZI”
源氏物語(Fikcia rakonto pri princo GENZI)絵巻

圍棋(*Weiqi*)-바둑(Baduk)-碁:GOo

La plej malnova registrita partio de go en Japanio, laŭ legendo, estas tiu ludita en 1252 inter NITIREN(日蓮: Budhana monaĥo kaj filozofo) kaj lia disĉiplo KISSYOU-MARU(吉祥丸 poste nomita NITIROU(日朗: Budhana monaĥo)). Tamen, verŝajne ĉi tio estas falsaĵo kreita en posta epoko.



# Historio de Goo en Japanio
Tradukaĵo el retpaĝo;
https://ja.wikipedia.org/wiki/囲碁の歴史

- Alveno al Japanio
- Disvastiĝo de Amantoj
- Ora Epoko de EDO
- Naskiĝo de NIHON-KI-IN
(日本棋院: Japana GO-Instituto)

# - Disvastiĝo de Amantoj

En la MUROMATI(室町)-epoko(p.K. 1336-1573), GOo, antaŭe amata ĉefe de la nobelaro kaj monaĥaro, disvastiĝis ankaŭ inter la militistaro kaj la popolo. Samtempe, diversaj kalkulludoj uzantaj GOan tabulon kaj GO-ŝtonojn estis inventitaj kaj populariĝis.

Iuj el milite aŭ ekonomike fortaj homoj ektenis duonspecialigitajn ludantojn nomatajn “GO-UTI(碁打ち: GOisto)” aŭ “ZYOUZU(上手: la leretulo)” por konkuri inter si. Inter ili estis membroj de la DOU-BOU-SYUU(同朋衆kiuj plenumis diversajn taskojn kaj distrajn artojn proksime de la Ŝoguno(将軍: la militista-registar-estro).) kaj ofte homoj de nekonata deveno.

En la epoko de la Militŝtatoj en Japanio(戦国時代 p.K. 1467/93-1573), GOo estis tre ŝatata kiel simulaĵo de batalo kaj atingis sian floradon. Estas registroj dirantaj, ke multaj militestroj de tiu tempo, inkluzive de TAKEDA Singen(武田信玄), ŝatis GOon.

Tiam elstaris NIKKAI(日海: monaĥo, poste konata kiel HON'INBOU Sansa(本因坊算砂), p.K. 1559-1623). Dum ĉi tiu epoko, oni transiris al la moderna maniero komenci GO-ludon de malplena tabulo. Pro tio, la koncepto de HUSEKI(布石: komenca strategia aranĝo, 'formaciado') ankaŭ estis formita ekde la tempo de SANSA(算砂).

Sansa(算砂) estis la instruisto de GOo por famaj militestoroj, ODA Nobunaga(織田信長), TOYOTOMI Hideyosi(豊臣秀吉), kaj TOKUGAWA Ieyasu(徳川家康), kaj laŭdire ĉiuj tri ludis kontraŭ li kun kvin-ŝtona handikapo. Se oni komparas, Sansa(算砂) estus ekvivalenta al nuna pint-profesiulo, kaj la tri militestoroj al nuntempaj amatoraj 4-a aŭ 5-a DAN-ludantoj. Sansa(算砂), kies kapablo estis agnoskita de Nobunaga(信長), ricevis la rajton porti la titolon MEIZIN(名人: La Majstro).



本因坊算砂

Poste, Sansa(算砂) estis alte taksata ankaŭ de Hideyosi(秀吉) kaj ricevis subtenon, kaj post la fariĝo de Ieyasu(家康) kiel ŝoguno, li estis nomumita MEIZIN GO-DOKORO(名人碁所: ĉefestro de GOo), kun la rolo superrigardi la GOan mondon (li ankaŭ ricevis la postenon de SYOUGI-DOKORO(将棋所: respondeculo pri SYOUGI(将棋: japana ŝako)).

Ekde la epoko de la Militŝtatoj en Japanio(戦国時代) ĝis la EDO(江戸: nomo de la urbo, kie lokita estis militista registaro de TOKUGAWA(徳川) familio, nuntempa TOKIO)-epoko(p.K. 1603-1868) estis periodo de granda progreso por la nivelo de GOo en Japanio.

# Historio de Goo en Japanio
Tradukaĵo el retpaĝo;
https://ja.wikipedia.org/wiki/囲碁の歴史

- Alveno al Japanio
- Disvastiĝo de Amantoj
- Ora Epoko de EDO
- Naskiĝo de NIHON-KI-IN
(日本棋院: Japana GO-Instituto)

# - Ora Epoko de EDO

Dum la epoko EDO, la kvar familioj HON'INBOU(本因坊), INOUE(井上), YASUI(安井), kaj HAYASI(林), gvidataj origine de Sansha(算砂) el HON'INBOU(本因坊)-familio, fariĝis la oficialaj heredaj lernejoj de go, edukante talentajn ludantojn kaj konkurante unu kun la alia. Ĉiu el la kvar familioj ricevis subtenon de la ŝoguna registaro, kaj iliaj familiestroj(宗家) estis nomumataj ne laŭ heredeco, sed laŭ merito (kvankam familia deveno ankaŭ havis influon). La ĉefa scenejo por montri sian lertecon estis la ĉiujara OSIRO-GO(御城碁), oficiala matĉo en Edo-kastelo antaŭ la ŝoguno. Tiuj matĉoj estis grava honora evento por la familioj; perdi en OSIRO-GO(御城碁) estis granda malhonoro, kaj influis eĉ la nombron de lernantoj.



OSIRO-GO(御城碁), oficiala matĉo en Edo-kastelo antaŭ la ŝoguno
(miniatura reproduktaĵo)

La titolo MEIZIN-GODOKORO(名人碁所), kiu estis la ĉefgvidanto de la go-mondo, devis aparteni al unu el la familiestroj(宗家) de la familioj kaj postulis ne nur superan lertecon sed ankaŭ estimon de aliaj familioj pro personeco. La MEIZIN-GODOKORO(名人碁所) havis specialajn privilegiojn, inkluzive de la rajto atribui rangojn, kio instigis interdomajn batalojn por tiu pozicio. La decido pri tiu posteno ofte estis farita per oficiala konkurencoludo nomata SOUGO(争碁, defia matĉo).

La unua registrita SOUGO(争碁) okazis inter la dua familiestro de HON'INBOU(本因坊), San'etsu(算悦) kaj la dua familiestro de YASUI(安井), Santi(算知). Temis pri protesto kontraŭ la rangodiferenco dum OSIRO-GO(御城碁), kiu kondukis al ses matĉoj dum naŭ jaroj, rezultante en 3 venkoj kaj 3 malvenkoj, ĝis la morto de San'etsu(算悦).

Poste, dek jarojn post la morto de San'etsu(算悦), Santi(算知) fariĝis MEIZIN-GODOKORO(名人碁所). Tamen, Douetsu(道悦) — disĉiplo de San'etsu(算悦) kaj la tria familiestro de HON' INBOU(本因坊) — kontraŭis tion kaj komencis alian SOUGO(争碁). Kvankam li kontraŭis la volon de la registaro, riskante ekzilon aŭ eĉ morton, li daŭrigis la defion. Ili ludis 20 partiojn, kun rezulto 12 venkoj, 4 malvenkoj, kaj 4 egal-ludoj por Douetsu(道悦), post tiam Santi(算知) demisiis. Douetsu(道悦), deklarante sian obeon al la aŭtoritatoj, retiriĝis kaj transdonis la estrecon al sia disĉiplo Dousaku(道策).

Dousaku(道策), la kvara familiestro de HON'INBOU, facile venkis ĉiujn konkurantojn, ludante eĉ kun du-DANaj handikapoj, kaj estis laŭdata kiel reala 13-DANa ludanto. Li fariĝis MEIZIN-GODOKORO(名人碁所) sen disputo. Kune kun Sansa(算砂), li estas konsiderata kiel unu el la plej eminentaj figuroj en la historio de la HON' INBOU(本因坊)-familio.

Dum la epoko de Dousaku(道策), multaj talentuloj kolektiĝis sub lia gvido, sed probable pro severa trejnado, multaj mortis junaj. Inter ili, Douteki(道的), konsiderata kiel genia infano, atingis egalecon kun sia majstro je la aĝo de 19. Dousaku(道策) poste elektis alian grandan talenton, Douchi(道知), kiel sian posteulon, kiu ankaŭ fariĝis MEIZIN-GODOKORO(名人碁所).

Post Douchi(道知), la HON'INBOU-familio stagnis, kun tri sinsekvaj familiestroj atingantaj nur la sesan DANon. Tiu periodo estis konsiderata kiel epoko de malfortiĝo.

Tamen, la naŭa familiestro de HON'INBOU Satugen(察元) revenigis la gloron de la familio per sia potenco kaj fariĝis MEIZIN-GODOKORO(名人碁所). Samtempe, la sepa familiestro de YASUI Senti ({大}仙知) ankaŭ havis brilan, artisman ludstilon kaj forte influis postajn generaciojn.

De la fino de la 18-a jarcento ĝis la komenco de la 19-a, okazis intensa rivaleco inter la dekunua familiestro de HON'INBOU, Genjou(元丈) kaj la oka familiestro de YASUI Titoku(知得). Ili ludis pli ol 80 partiojn kun preskaŭ egala rezulto, kaj estas konsiderataj la plej grandaj rivaloj de la EDO(江戸)-epoko. Kune kun la dekunua familiestro de INOUE Gen'an Inseki(幻庵因碩) kaj la dek-kvara familiestro de HON'INBOU Shuuwa(秀和), kiuj havis MEIZIN-nivelon sed ne atingis la postenon, ili estas nomataj la Kvar Filozofoj de GOo.

La dek-dua familiestro de HON'INBOU, Zyouwa(丈和) estis elstara ludanto, sed akiris la titolon MEIZIN-GODOKORO(名人碁所) per ruzoj, superante Gen'an Inseki(幻庵因碩), kio makulis lian reputacion. Tamen lia kapablo estis inter la plej altaj en la historio.

En 1840, dum matĉo organizita de la MATUDAIRA-familio (parenco de la ŝoguna familio), li venkis disĉiplon de Gen'an Inseki(幻庵因碩), AKAHOSI Intetu(赤星因徹) per tri mirindaj movoj, evento rigardata kiel kulmino en EDO(江戸)-GO-historio.

Post la emeritiĝo de Zyouwa(丈和), Gen'an Inseki(幻庵因碩) esperis fariĝi MEIZIN-GODOKORO(名人碁所), sed estis malhelpata de la juna genio HON'INBOU Syuuwa(秀和). En OSIRO-GO(御城碁), Syuuwa(秀和) venkis Gen'an Inseki(幻庵因碩) kaj haltigis liajn ambiciojn. Kvankam Syuuwa(秀和) estis konsiderata la plej forta ludanto de la historio, lia peto por fariĝi MEIZIN-GODOKORO(名人碁所) estis malakceptita pro la politika kaoso dum la malfrua EDO(江戸)-epoko.

La disĉiplo de Syuuwa(秀和), HON'INBOU Syuusaku(秀策), montris brilecon jam junaĝe kaj atingis la rekordon de 19 venkoj el 19 partioj en OSIRO-GO(御城碁). Tamen, li mortis pro ĥolero en la aĝo de 34. Syuuwa(秀和), Syuusaku(秀策), kaj la disĉiplo MURASE Syuuho (村瀬秀甫, poste HON'INBOU Syuuho) kune estas nomataj la Tri Syuu(秀), simbolante la floradon de EDO(江戸)-epoka GOo.

Dum la Edo-epoko, ne nur SAMURAJoj(tiamaj japanaj militistaroj), sed ankaŭ komercistoj kaj riĉaj terkultivistoj dungis profesiajn ludantojn por amuziĝi. Kiel montrite en rakontoj, GOo estis vaste ludata inter la popolo.

Tamen, en iuj regionoj, ĝi estis traktata kiel vetludo simila al triktrako, kaj tial estis malpermesita.

# - Naskiĝo de NIHON-KI-IN (日本棋院: Japana GO-Instituto)

Tamen, kiam la EDO(江戸)-ŝoguna registaro kolapsis pro la MEIZI(明治)-restarigo, ankaŭ la sistemoj de la GO-familioj, kiuj perdis siajn patronojn, disfalis. HON'INBOU Syuuwa(本因坊秀和), la estro de la HON'INBOU-familio, suferis pro malfacila vivo kaj eĉ devis loĝi en magazeno por iom da tempo. Krome, pro la tendenco al okcidenta civilizo kaj la malrespekto al tradiciaj valoroj, ankaŭ la GOo mem estis subtaksata.

En tiu situacio, por ne lasi la fajron de igo estingiĝi, MURASE Syuuho (村瀬秀甫) fondis en 1879 la igo-socion "HOUEN-SYA(方円社)" (kie "hou" signifas kvatraton, la tabulon kaj "en" cirklon, la ŝtonojn - "houen" estis alternativaj nomoj por GOo).
Ili provis disvastigi la ludon inter pli larĝa publiko, ekzemple per enkonduko de rangosistemo.
Responde, TUTIYA Shuuei (土屋秀栄, poste HON'INBOU Shuuei), filo de Syuuwa(秀和), fondis la "GO-Instigadan Asocion(囲碁奨励会)" en 1892.
Tiel komenciĝis la periodo de rivaleco inter la du asociaj grupoj, sed en 1886 Shuuei (秀栄) cedigis al Syuuho(秀甫) la titolon de HON'INBOU (本因坊) kaj interpaciĝis kun li. Tamen, unu monaton poste, Syuuho(秀甫) mortis, kaj Shuuei(秀栄) reprenis la titolon de HON'INBOU (本因坊).

En tiu situacio, por ne lasi la fajron de igo estingiĝi, MURASE Syuuho (村瀬秀甫) fondis en 1879 la igo-socion "HOUEN-SYA(方円社)" (kie "hou" signifas kvatraton, la tabulon kaj "en" cirklon, la ŝtonojn – "houen" estis alternativaj nomoj por GOo).
Ili provis disvastigi la ludon inter pli larĝa publiko, ekzemple per enkonduko de rangosistemo.
Responde, TUTIYA Shuuei (土屋秀栄, poste HON'INBOU Shuuei), filo de Syuuwa(秀和), fondis la "GO-Instigadan Asocion(囲碁奨励会)" en 1892.
Tiel komenciĝis la periodo de rivaleco inter la du asociaj grupoj, sed en 1886 Shuuei (秀栄) cedigis al Syuuho(秀甫) la titolon de HON'INBOU (本因坊) kaj interpaciĝis kun li. Tamen, unu monaton poste, Syuuho(秀甫) mortis, kaj Shuuei(秀栄) reprenis la titolon de HON'INBOU (本因坊).

Pro la entuziasmo ĉirkaŭ la matĉoj, gazetoj ankaŭ komencis inkluzivi GO-rubrikojn, kaj la intereso de la ĝenerala publiko pri GOo kreskis. La 1-an de aprilo 1878, la gazeto "YUUBIN HOUTI SINBUN(郵便報知新聞)" publikigis GO-registraĵon de matĉo inter NAKAGAWA Kamesaburou(中川亀三郎 6-DANa) kaj TAKAHASI Kinesaburou(高橋杵三郎 5-DANa), kio estas konsiderata la komenco de GO-rubrikoj en gazetaro.

Post reiro al la pozicio de HON'INBOU (本因坊), Shuuei(秀栄) supervenkis multajn fortajn ludantojn kaj unuecigis la GO-mondon, fine akirante la rangon de MEIZIN(名人) en 1906. Tamen post lia morto, multaj grupoj ekestis, kaj la GO-mondo enfalis en kaoson. Shuuei (秀栄) mortis sen nomumi posteulon, tiel ke TAMURA Yasuhisa(田村保寿 poste HON'INBOU Shuusai(本因坊秀哉)) kaj KARIGANE Zyun'iti(雁金準一) konkuris pri la hereda pozicio, kaŭzante malordon.

Fine, la frato de Shuuei(秀栄), HON'INBOU Shuugen(本因坊秀元), portempe heredis la titolon de la dudeka HON'INBOU(本因坊), kaj unu jaron poste transdonis ĝin al Shuusai(秀哉), tiel solvinte la krizon.

En tiu situacio, okazis la Granda KANTOU-Tertremo(関東大震災), kiu ankaŭ severe trafis la igo-mondon. Ekestis sento ke la divido ne estas dezirinda por elteni la malfacilaĵojn, kaj laŭ la instigo de OOKURA Kisichirou, fama kiel fondinto de la Imperia(帝国) Hotelo, tute da japanaj GOistoj kuniĝis kaj fondis la Japanan GO-Instituton(日本棋院) en 1923.

Tuj post la fondo, iuj GOistoj secesiis kaj fondis la organizon KISEI-SYA(棋正社), kio kondukis al kontraŭmatĉoj kun la Japana GO-Instituto. La matĉo inter HON'INBOU Shuusai(本因坊秀哉), tiama MEIZIN(名人), kaj KARIGANE Zyun'iti(雁金準一) publikigita en gazeto fariĝis tre populara. Oni diras, ke pro tio, la gazeto YOMIURI SINBUN(読売新聞) triobligis sian eldonkvanton. En 1927, komenciĝis la OO-TEAI(大手合: rang-determinaj matĉoj por profesiaj ludantoj), kiuj ankaŭ akiris grandan popularecon en la gazetaro.


En 1934, ABE Sin'nosuke(阿部眞之助), direktoro de la kultura sekcio de la Tokia NITINITI SINBUN(東京日日新聞), planis turnirojn por determini la "reale merititajn majstrojn(実力名人戦)" de GOo kaj japana ŝako. En 1935, la MEIZIN -turniro por ŝako komenciĝis. Por GOo, laŭ la volo de HON' INBOU Shuusai(本因坊秀哉), oni decidis nomi la turniron "HON'INBOU-SEN(本因坊戦)" kaj anoncis la forigon de la herediga sistemo de la HON'INBOU-titolo. Shuusai(秀哉) transdonis la titolon de HON'INBOU(本因坊) al la Japana GO-Instituto. En 1936, la Instituto decidis okazigi turniron por konkurenci pri la titolo de HON'INBOU(本因坊). Tio estis la komenco de la HON'INBOU -turniro kaj samtempe la unua titolo-matĉo en la GO-mondo.

Antaŭ sia emeritiĝo, Shuusai(秀哉) ludis sian adiaŭan matĉon kontraŭ KITANI Minoru(木谷実) dum pluraj monatoj en 1938 (KITANI havis la komencan meton kaj venkis je kvin poentoj). Mallonge post la fino de tiu matĉo, Shuusai(秀哉) mortis.

La persono kiu poste anstataŭis Shuusai(秀哉) kiel la gvida figuro de la GO-mondo estis la genia ludanto *Wu Qingyuan* (呉清源Go Seigen), veninta el Ĉinio. En 1933, kune kun KITANI Minoru(木谷実), li prezentis la t.n. Nova Formaciado(新布石shin-fuseki), kiu rompis la antaŭajn konceptojn de formaciado en GOo.
En la sama jaro, li ludis partion kontraŭ Shuusai(秀哉) (ekstreme nekutiman, ĉar li ne anticipemetis egaligajn ŝtonojn kvankam li estis nur 5a-DANa kontraŭ MEIZIN), kaj jam en la komenco li montris tre novan formaciadon kun la ŝtonoj sur HOSI(stelo), SAN-SAN(3-3) kaj TENGEN(zenito), mirigante la publikon.

Tiu Nova Formaciado ekigis veran furoron ĉirkaŭ GOo, ne nur en la GO-mondo, sed ankaŭ inter la ĝenerala publiko.

圍棋(*Weiqi*)-바둑(Baduk)-碁:GOo




本因坊秀哉名人
対
呉清源(先番)

Vidu janan retpaĝon;
https://jega.shisyou.com/jega/facila_serio/formaciado/index.htm